# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 8 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 8

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

## BELGIO

En "nia" lando, kvankam ili ne plu estas la plej multnombraj en la parlamento kaj senato, la klerikaluloj regadas la plimulton de la lernejoj, kaj la riĉaj katolikoj... kaptas por tiuj lernejoj 62% de la tutlanda lernantaro. Plie, la pastroj havas rajton fari religiajn kursojn en la laikaj (ŝtataj) lernejoj, sed, almenaŭ leĝe, la infanoj povas esti maldevigataj ĉeesti tiujn kursojn — sufiĉas ke la gepatroj skribu al la direkcio de la lernejo. Ĉu necesas komentarii tiun liberecon? Certe ne, ĉar la legantaro de "S-ulo" scias la valoron de "leĝa" libereco por la malriĉuloj.

La klerikaluloj organizas lernejojn, kaj la nekredantoj ilin pagas, tute kiel la klerikaluloj!... Vi ne komprenas? Jen klarigo: La politikaj reprezentantoj de Laborista, Liberala kaj Katolika Partioj voĉdonas la necesajn milionojn, teorie je la nomo de la "lerneja paco", sed fakte, por ke la "liberaj" (legu: katolikaj) lernejoj povu konkurenci la laikajn!

Sen iu ebla dubo, tio ne sufiĉas al la katolika kapitalismo. Logike ĝi celas fariĝi mastro de la tuta publika instruado.

Ĝenerale la geinstruistoj de la katolikaj lernejoj estas "sanktaj fratetoj kaj fratinetoj". La ensutanigataj fratetoj estas fraŭlaj, sed ne estas senseksaj. Tio estas ofte pruvita de iliaj viktimoj: la "tre karaj geknaboj".

Pli ol ses miloj da katolikaj, judaj kaj protestantaj pastroj estas, en "nia glora kaj progresema patrolando", pli bone pagataj ol la geinstruistoj civitaj.

Ekzistas "Nacia Federacio de Liberpensuloj". La plimulto de la membroj konsistas el proletoj, sed la organizo estas direktata de la burĝa demokrata ideologio, t. e. estas apenaŭ kontraŭklerikala. Ĝi sin deklaras super la partioj kaj klasoj. Antaŭ ses jaroj la Brusela Federacio eksiĝis kaj poste fariĝis "Materialista Ligo de Belgio", ĝi aliĝis al la "Internacio de la Proletaj Liberpensuloj" (I. P. F.). Jen sube ĝia principara Deklaro.

Lasttempe ni publikigis broŝuron en franca lingvo de nia K-do Jean Gueux, kiu klarigas tiun Deklaron (32 paĝoj. Prezo: unu franca franko).

Ĵus nun ni ankaŭ eldonas broŝuron 32-paĝan de nia K-do Emile Chapelier: "La Proleta Liberpenso kontraŭ la burĝa Liberpenso". (Prezo: unu franca franko, sendo senkosta).

Ni eldonas monatan ĵurnalon: "Le Matèrialiste". Jarabono: 8.50 francaj frankoj. Ni uzas esperanton.

### Principara deklaro de la Materialista Ligo de Belgio

Fundamenta principo:

1. Nenio ekzistas ekstere de la materia mondo. La ideoj rezultas de la sentaĵaro. Ili devenas el la propreco de la materio, kiu konsciiĝas, kiam ĝi estas organiziĝinta.

2. El tio, ke la ideoj rezultas de la materiaj faktoj, sekvas, ke la homo estas produkto de la medio, en kiu ĝi vivadas. Liaj ideoj aliformiĝas kune kun tiu medio, — ĉu ili adaptiĝas pasive, ĉu ili reagas kontraŭ la eksteraj fortoj.

3. La prahistorio de la homo estas tiu de la luktado kontraŭ la naturaj elementoj por la konservado de la speco. El tiu luktado eliras la unuaj ideoj, la unua intelekta formiĝo.

Por praulo afero estas justa, se ĝi estas favora por liaj vivaj bezonoj, kaj maljusta, se ĝi kontraŭagas ilin.'

Tiele naskiĝis ĉe la homoj la ideo pri justeco.

4. Tiu unua intelekta formiĝo intervenas iom post iom en la malrapidan organizadon de la societo.

En organizata societo, la ekonomia produktmaniero pli gravas ol la naturaj faktoroj kaj konsistigas dum ĉia historia epoko, la bazon de la socia kulturo, kaj, konsekvence, de la politika kaj intelekta historio de la epoko.

La intelekta produktado dependas de la materia produktado kaj transformiĝas kun ĝi.

5. La religio, la moralo, la filozofio evoluas kaj adaptiĝas, dum ĉia epoko, al la ekonomia vivo. Ili elmontriĝas kiel la superstrukturoj de reĝimo, kies firmigilaro estas tute materia.

6. La produktaj formoj, kiuj sinsekvis ĝis nun, — sklaveco, servuteco, salajreco —, havis, kiel bazon, l' ekspluatadon al la homo fare de la homo. Tial ni vidas, ke la historio de la civilizado estas la historio de luktado inter regantaj kaj regataj klasoj.

La regantaj ideoj de iu epoko estas ĉiam la ideoj de la reganta klaso. Tia! afero estas justa, se ĝi kunhelpas la kreskadon de la reganta klaso, kaj maljusta, se ĝi kontraŭas ĝin.

Sed kontraŭ tiu klasa justeco, aganta de supre al malsupre, kontraŭstaras alia klasjusteco, direktata de malsupre al supre, de la subpremataj klasoj. Ĝi nur ekestas kiel depostulo, pligrandiĝas laŭmezure kiel la reĝimo diseriĝas per la ekfiniĝo de la reganta klaso, kaj finfine sin trudas perforte. Ekzemple: la filozofia movado de la XVIII. jarcento.

7. Se ni vidas, dum la XVIII. jarcento, la ideojn de konscienca libereco sin trudantaj kaj disvastiĝantaj, estas tial ke la estado kaj disvolviĝo de la burĝa klaso — tiam revoluciema klaso — havis kiel subtenilon, en la materia kampo, la liberecan konkurencon.

La konscienca libereco kaj la libera penso, kiu devenas el ĝi, estas nur translokigo, en la intelektan kampon, de la libera konkurenco.

En la landoj, kie la opinia libereco estas proklamata por ĉiuj, estas fakto, ke tiu rajto nur ekzistas por tiuj, kies opinioj ne estas danĝeraj por la regantaj klasoj.

8. La antaŭa paragrafo difinas la materialismon de la historia vidpunkto.

La Materialista Ligo de Belgio aliĝas al tiu principaro.

Dum nia epoko la reganta klaso estas la kapitalista burĝaro, la subpremata klaso estas la proletaro.

La Materialista Ligo de Belgio celas disvastigi la materialistan filozofion, kiu devas esti, por la proletaro de la XX. jarcento tio, kio estis, por la burĝaro, la filozofia movado liberpensula de la XVIII. jarcento.

Enkondukis kaj tradukis
la redakcia sekretario de la L. M. B.:
SAT-ano 9106 (Bruselo).

P. S. Adresu leterojn kaj dokumentojn al la ĝenerala sekretario C. SERWY, 13, rue Henri Jacobs, Bruxelles (Belgio).

## LA RELIGIAJ PARAZITOJ HAVAS BONAN SALAJRON

### En Svedio laboristoj gajnas 2000 kronojn, sed pastroj 25 000 kronojn po jaro

En Svedio la laboristoj laborakiras ĝenerale 2 mil ĝis 2500 kr. po jaro. Multaj, ekzemple la tekslaboristoj kaj tekslaboristinoj ricevas pli malmulte, same ankaŭ multaj aliaj grupoj, dum la plej bone pagitaj laboristoj kompreneble povas akiri iom pli.

Sed ekzistas grandaj grupoj da parazitoj, kiuj ricevas multe pli. Inter tiuj parazitoj estas la pastroj — la reprezentantoj de dio. Mi notos kelkajn pastrajn salajrojn de la urbo Göteborg. La listo de la salajroj montras tiujn ĉi sumojn por dudekkvin pastroj; 1 ricevas 9500, 4 — 10500, 1 — 11000, 3 — 12000, 1 — 13000, 2 — 14000, 3 — 15000, 3 — 17000, 3 — 18000, 1 — 20000, 1 — 22500, 1 — 26000 kaj 1 — 71058 svedajn kronojn po jaro.

Dum laboristaj familioj devas loĝi en unu ĉambro kaj kuirejo kaj multaj eĉ en malgranda ĉambro, la pastroj havas 8 ĝis 15 ĉambrojn bone meblitajn. Jes, la pastraj etaĝoj kostas plej ofte same multe kiel tuta jarsalajro por laborista familio kaj ofte eĉ dufoje kaj pli ol kiun povas laboristo akiri por luo, manĝo kaj vestoj por la familianoj.

Kaj tiuj pastroj estas pagataj per la impostoj, kiuj pagas la malriĉaj laboristoj, ĉar protestanta eklezio de Svedio estas ŝtata kaj ĉiuj, eĉ ili, kiuj tute ne aprobas la religion protestantan, devas per siaj impostoj helpi subteni la pastraĉojn, la parazitojn.

Nur unu partio, la komunista, postulas, ke oni disigu la eklezion de la ŝtato. Kelkaj socialdemokratoj estas pretaj subteni tian proponon, sed la partio estas nun klerikala, ĉar tro multe da pastroj havas influon en la partio, estas socialdemokrataj parlamentanoj ktp.

Einar Adamson.